**SCIENCA REVUO, oficiala organo de ISAE**
**Vol. 37 (1986), n-ro 2 (152)**

**Eldonanto:** Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE)
**Ĉefredaktoro:** *RNDr. Josef Kavka, CSc., Lužná 7, CS-160 00 Praha 6 — Vokovice,* Ĉeĥoslovakio
**Grafika redaktoro:** Bruĉjo Kasini, «Edistudio», *c. p. 213, I-56100 Pisa,* Italujo
**Administranto por la pagipovaj landoj:** «Edistudio», pĉk 12230561, Italujo, ☎ +39(50)48670
**Administranto por la nepagipovaj landoj:** *Dr. Václav Hník, CSc., Fakulta architektury ČVUT, Thákurova 7 — CS-166 34 Praha 6 — Dejvice,* Ĉeĥoslovakio
**Kompostis:** «Composit», *via Giordano Bruno 8, I-56100 Pisa,* Italujo
**Enpaĝigis:** «Edistudio», *c.p. 213, I-56100 Pisa,* Italujo
**Presis:** *Tecnostampa coop r.l., Pisa,* Italujo

### Reguloj por la aŭtoroj:

1. Verki laŭeble pri sia propra originala esplorado tiel, ke ĝin komprenu eĉ alifakaj sciencistoj;
2. Sendi al la ĉefredaktoro la tekston en 2 ekzempleroj, klare tajpitaj sur maldika papero;
3. Maŝinskribi normallitere en la tajp-areo de 165 mm × 250 mm, kun la liniado $1^1/_2$, t.e. kun 40 linioj surpaĝe;
4. Ĉiun vorton neesperantan substreki ondlinie (por la kursiva komposto), dum rektlinia substreko signifas komposton dikliteran;
5. En la teksto noti lokojn, kie troviĝu eventualaj figuroj;
6. Ne forgesi referenc-liston;
7. Aldoni koncizan resumon en sia gepatra lingvo.

### Estraro de ISAE:

**Prezidanto:** Prof. D-ro *Carl Stöp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, N- Oslo 2,* Norvegio
**Vicprezidantoj:** Prof. *Sin'itirô Kawamura, 424-7 Kinasityô Huzii, Takamatu, 760,* Japanio
Prof. *Vasil Peevski* D-ro *hc., Gogol 9, BG-1504 Sofia,* Bulgario
**Ĝenerala sekretario:** (provizore) S-ro Bruĉjo Kasini, *c. p. 213, I-56100 Pisa,* Italujo
**Sekretario-kasisto:** Prof. *Paul E. Kustaanheimo, Danmarks Tekniske Højskole, 040 DIA-E, DK-2800 Lyngby,* Danlando
**Aliaj estraranoj:** S-ro *Rüdiger Eichholz,* direktoro de TC-ISAE, *R.R.1, Bailieboro, Ontario, K0L 1B0,* Kanado
D-ro *W.A. Verloren Van Themaat,* direktoro de IC-ISAE, *Volkerakstraat 38^I, NL-1079 XT Amsterdam,* Nederlando
D-ro *Josef Kavka CSc., Lužná 7, CS-160 00 Praha 6 — Vokovice,* Ĉeĥoslovakio
D-ro *Gerhard Kalckhoff, Schuckertstraße 14/XI, D-8000 München 70,* F.R. Germanio
D-ro *Václav Hník CSc., Podjavorinské 1609/6, CS-149 00 Praha 4 — Chodov,* Ĉeĥoslovakio



# Emocia respeguliĝo de la familia vivo

*Tyburcjusz Tyblewski* (Pollando)*

## 1. Enkonduko

Esplorante sintenojn rilate al la socia realo, ni provis ekkoni iliajn emociajn komponantojn ĉe la licea junularo. La esploro ampleksas pli ol 80 elementojn de la socia vivo, pritaksitajn pozitive kaj negative fare de proksimume 2 000 personoj (gelernantoj, gestudentoj kaj geinstruistoj). **Adoleskantoj** en nombro de 170 (112 knaboj, 58 knabinoj) demanditaj indikis, kio por ili estas fonto de kontento, de fiero, de ĝeno, de malĝojo, de maltrankvilo, de kulposento, de kolero, de angoro kaj de abomeno. Laŭ la terminologio akceptita en la pola psiĥologio, **adoleskeco** estas la fazo de transira aĝo inter 12 kaj 18 jaroj (laŭ *Żebrowska* 1966).

Fiziologoj de la pri superaj nervaj aktivecoj ligas la **emocierĝan** sferon kun aktivado de la kortiko. Funkciado de la subkortikaj centroj tamen ligiĝas tre kompakte kun aktiveco de la kortiko, kiu ĉiam restas sub influo de impulsoj fluantaj el la subkortiko, reguligante samtempe la funkciojn de tiuj centroj. Tial — kun escepto de apartaj okazoj — en la nuntempa psiĥologia terminologio manifestiĝas la tendencoj identigi emociojn kun afekcioj (*Tyblewski 1984*). Kaj la lastajn oni difinas kiel: psiĥan travivaĵon rilatiĝi al aktuale aŭ pli frue aktivantaj stimuloj, t.e. al objektoj, homoj, al si mem, al propra agado, al abstraktaj fenomenoj k.t.p.

En la aplikata divido je du klasoj: la emocioj estas pli primitivaj, kiel plezuro, malplezuro, timo, kolero, diference disde la afekcioj, la pli superaj kaj la pli komplikaj, kiel dankemo, honto, ĵaluzo k.a.

* D-ro, emerita estro de Sociologia Laborejo en Instituto de Socia Medicino (*Samodzielna Pracownia Socjologii Medycyny*), *ul. Bartka Zwycięzcy 11/1, 58-500 JELENIA GÓRA*

La psiĥologoj akorde konstatas la principajn diferencojn inter la afekcia vivo de adoleska periodo kaj de aliaj evolufazoj de la infano. La ŝanĝojn oni vidas ne nur en enhavo de la travivaĵoj, sed ankaŭ en la formo, t.e. en la kuro, ritmo, intenseco kaj dinamismo. La kaŭzojn de la pligrandiĝinta emociiĝo psiĥologoj vidas en fiziologia sfero (transformiĝo de la hormonaj funkcioj de la organismo) kaj en la vasta sfero de la sociaj spertoj. Kiel karakterizajn ecojn de la afekcioj en tiu periodo oni mencias: intensecon kaj viglecon, ekz. la malĝojo estas travivata profunde kaj havas dimension de "la tragedio"; facilecon ŝanĝiĝi de la agordoj (de entuziasmo ĝis rezignemo); emocian ŝanceliĝemon (de bonkoreco ĝis krueleco); senobjektivecon de la afekcioj (la travivado ne efikas el difinitaj stimuloj aŭ fontoj).

Samtempe tamen la adoleskantoj maskas siajn afekciojn kaj akceptas rilate al plenaĝuloj iujn pozojn (fanfaronemo, senĝeneco, senceremonieco k.a.) por maski la efektivajn travivaĵojn. Ĉi-sence la afekcia kaj la socia evoluoj estas inter si forte plektitaj; ili povas realiĝi nur per partopreno en diversaj sferoj de la socia vivo.

En frua periodo de adoleskeco kreskas la timemo (ankaŭ la hontemo) ligitaj plej kompakte kun evoluo de la socia konscio kaj kun atendado ricevi pozitivan pritakson de propra kondutado flanke de la aliaj. Se la adoleskant(in)o renkontiĝas kun malaprobo de la medio aŭ eĉ kun humiligoj, li (ŝi) serĉas eliron en agreso aŭ en fuĝo, kvankam multaj iliaj timoj efikas ne tiom el la efektivaj situacioj, kiom el la imagataj kaj antaŭvidataj.
Kvankam maltrankviloj (korpremoj) aperas en diversaj vivperiodoj, tamen probable ili estas karakterizaj por adolesko. La korpremoj estas kaŭzataj per eventoj pasintaj kaj anticipado de sekvontaj, precipe kiam la subjekto forte strebas al sukceso. Ofte ili koncernas eksteran aspekton lige kun la seksa maturiĝado kaj lige kun la penoj atentigi pri si personon de alia sekso.

Alia ofte travivata afekcia stato estas **kolero**, sub kies influo la adoleskantoj reagas ofte agreseme, manifestante la tendencon al forŝovo de la obstaklo. Ili esprimas la koleron per sombra silento, per kritikado, per sarkasmo, per blasfemoj. Plejparte la kaŭzoj de kolero ĉe adoleskantoj devenas de rilatoj kun aliaj homoj, kiuj limigas iliajn rajtojn aŭ ne volas ilin kompreni. Laŭ la testoj, aplikitaj de usonaj psiĥologoj, oni konstatis, ke knabinoj ĝenerale manifestas plian afekcian maturecon ol knaboj.

Transirante al detalaj problemoj de nia esploro, ni konstatu, ke en la aliaj fontoj mankas sufiĉaj priskriboj de afekcioj. La stato respegulas la scion pri ili, plejparte intuician, kun nesufiĉa nivelo, se ne la ignora. Klopodante, ke nia raporto proksimigu la konvenajn signifojn, ĉiun el la priparolotaj afekcioj ni difinos aparte ĉe la komenco de la konvena parto de la raporto. Estas ankaŭ avertende, ke ni ne havas sufiĉan pruvon pri identa kompreno de la nocioj fare de la esplorita junularo. Ekzemplo de "fiereco" videbligis malidentan ĝian komprenon.



Ni aldonu, ke la afekcioj naskiĝintaj en la familia vivo karakteriziĝas per precipa dinamismo; la intimaj rilatoj kaj la emociaj interligoj en la familio decidas ja ne nur pri kvalito kaj daŭreco de la ligoj, sed ankaŭ pri la graveco de familio por la ekzisto de pli vastaj grupoj.

## 2. Kontento

"Kontentigi — agi laŭ ies deziro, plenumi ies postulojn; kontento — plezura sento de la homo, kiu satigis siajn dezirojn, al kiu okazis io favora". Rideto de kontento, ekkrio de kontento estas esprimoj de la afekcio.

Ĉe la knabinoj plejparte la fonto de kontento estis:
sukcesoj en lernejo — 17,85%, etaj prosperetoj — 8,92%, plezura atmosfero hejme — 5,35% kaj: kiam aliaj estas kontentaj, bone plenumita tasko, kiam estas silente, kiam ĉirkaŭe estas amikoj, agnosko de aliaj, bonkoreco, bona vetero, rideto de knabo, ies kiso, kiam mi atingas ion pene, plezure travivita tempo, gajeco de aliaj, sukcesa ludo, renkonto kun la homo, kiun mi ŝatas, bonaj libroj, donacaĵo.

Ĉe la knaboj:

bonaj rezultoj en lernejo — 10,34%, bone plenumitaj taskoj — 8,62, la naturo — 5,17 kaj:
bona muziko, propra iniciato, ebleco pensi, amikeco, bonaj vortoj de aliaj, bonaj rezultoj en sporto, jarsezono, laborplena tago, mia sukceso, realigo de la revo, kontento pro mia viva rolo, bona ekskurso, sukceso en amo. Averto: 25,86% de la knaboj ne menciis la fonton.

## 3. Fiero

"Fiero — 1. la sento de persona digno: a) nobla ambicio; sento de propra valoro aŭ de la propra medio. Nacia fiero. Kreski pro fiero.

b) trotaksado de si mem, tromemfido, orgojlo. Ofendita fiero. Fierigi. Fie-

ra kiel pavo''.

Por la knabinoj fonto de la fiero estis:

laŭdoj (agnosko) — 12,50%, sukcesoj (bonaj notoj) — 12,50, konscio plaĉi al iu — 6,25% kaj:

celatingo, premio aŭ distingo, esti polino, kvalitoj de miaj proksimuloj (voĉo de mia patrino, la fratino, la familio, la gepatroj), mia karaktero, profesio de mia patrino, bone plenumita devo, lerni en la liceo, nenio kaŭzas mian fieron.

Por la knaboj:

la pola deveno — 6,89%, atingaĵo dank'al propra peno, — 6,89%, sportaj sukcesoj — 5,17% kaj:

la plej bonaj notoj, bone plenumita devo, venkado de si mem, agnosko en okuloj de la plej proksima familio, laŭdoj (se sinceraj), populareco de mia nomo inter la homoj. Averto: ne esprimis la opinion 43,10%.

## 4. Ĝeno

''Ĝeni — perdigi trankvilon, certon. Bari, malhelpi, malplezurigi, ĉagreni k.s.''

La knabinoj:

pro neoportuna situacio — 8,03%, pro amkonfesoj de viroj — 6,25%, pro nediskretaj demandoj — 6,25% kaj pro:

komplimentoj, interparoloj pri seksaj aferoj, societaj proponoj, simptomoj de ies troigita dankemo, respondoj je intimaj demandoj, ĉeesto de malsimpatiaj personoj, surprizaj renkontoj, neceso senŝuldigi iun, dubo pri maniero konduti, riproĉoj, gepatraj demandoj pri la knabo, pensoj pri estonteco, senkaŝiĝo de mensogo.

La knaboj:

pro sincera interparolo kun la amatino — 10,34%, pro subita situacio — 10,34%, pro interparoloj kun knabinoj — 8,26% kaj pro:

mallerta konduto, komplimentoj, riproĉoj de fremduloj, sento de malforteco, kiam ĉio fariĝas alie ol mi supozis, ekzamenoj. Averto: ne menciis la fonton 44,82%.

## 5. Malĝojo

''Malĝojo — la psiĥa stato estanta sekvo de malplezuraj travivaĵoj, suferoj; sento de premo, ĉagreno. Manifesti, kaŝi, trankviligi malĝojon''.

Por la knabinoj la fonto de malĝojo estis:

malsukcesoj en lernejo — 21,42%, streĉita atmosfero hejme — 9,82%, malbona vetero — 6,25% kaj:

malsano de proksimuloj, soleco, enuo, malsukceso en amo, maljustaĵo, malaprezo, manko de fido, malbona vido, maljustaj suspektoj de aliuloj, malbonfaro.

Por la knaboj:

malprospero en intimaj aferoj — 13,79%, manko de efektivaj amikoj — 6,89%, malsano de la plej proksimaj homoj — 5,17% kaj:

malvenko, seniluziiĝo pro la plej proksimaj homoj, neebleco reciproki la sentojn, kiam estas malbone hejme (kaj povus esti bone), kiam mi ne povas pruvi mian pravecon, kiam ploras mia knabino, se iu malsukcesas, amasiĝo de nesolvitaj aferoj.

## 6. Maltrankvilo (korpremo)

''Maltrankvilo — la psiĥa stato, kiun karakterizas: forta stimulo, streĉiĝo, necerteco, malkoncentriĝo, diversaj fiziologiaj simptomoj (kor-batado, ŝvitado k.a.), troa moviĝemo. Senti maltrankvilon, vivi en korpremoj.''

La demanditaj knabinoj maltrankvilis pro:

estonteco — 13,39%, malsukceso en lernejo — 8,92%, intenco studi — 5,37% kaj pro:

estonta edziniĝo, perfido, dufaceteco de la homoj, manko de sento pri sia valoro, granda ekscitiĝemo, konsciencriproĉoj, perspektivo de fraŭliniĝo, neeblo manifesti siajn valorojn, vivo de la gepatroj, probableco de io neatendata, ebleco gravediĝi, manko de mono, rilato de koleginoj, nefinfaro de multaj aferoj, necerteco pri sentoj de la knabo, manko de scio, morto de proksimuloj kaj de si mem.

La knaboj pro:

estonteco — 10,34%, malsukceso en lernejo — 6,89%, propra personeco — 5,17% kaj pro:

nuntempa politiko, propra honoro, civilizacio, soleco, manko de ĉarmo kaj saĝeco, manko de patro, socia sensentiveco, atendado de decido, manko de stabileco, estonta socia pozicio. Ne esprimis sian opinion 44,82%.

## 7. Kulposento

''Kulpo — ies malbona ago, eraro, peko, kontraŭmoralaĵo. Agnoski sian

kulpon.''

Por la knabinoj la fonto de tiu sento estis:

fari al iu damaĝon — 10,71%, kaŭzi ies malplezuron — 5,35%, konsciencriproĉoj — 5,35% kaj:

mensogoj, malgajeco de la patrino, mallaboremo, kverelo kun la gepatroj, nescipovo lerni, agoj kontraŭkonvinkaj, ploro de la knabo, perfido, ies riproĉoj, mia abrupteco, trouzo de vortoj, malhelpemo, neĝisplenumo de promesoj, sekvoj de miaj nerespondecaj agoj.

Por la knaboj:

la konscienco — 6,89%, neplenumo de la taskoj — 6,89%,

seniluziigo — 5,17% kaj:

ies damaĝo, malĝusta konduto, manko de decidemo, akuzemo, malgajeco de la damaĝitaj personoj, ŝtelo, indiferentemo rilate ies aferojn.

## 8. Kolero

''Kolero — la kolera ekscitiĝo, nervoziĝo, eksplodo de kolero. Senforta kolero; doni eliron al la kolero''.

Por la knabinoj la fonto de kolero estis:

stulteco de la homoj — 6,25%, malsincereco — 5,35%,

malĝusta konduto de iuj personoj — 5,46% kaj:

edukaj metodoj de la patro, de la avino, signifaj rigardoj de viroj, klaĉemo de koleginoj, malpureco de knabinoj, vulgareco, nekomprenemo de la gepatroj, naiveco de samaĝuloj, netoleremo de instruistoj, kritikemo de aliuloj, senkaŭzaj riproĉoj, laŭtaj paroloj dum filma spekto, interpersonaj rilatoj, troa memfideco de aliuloj, ies bonhumoro dum mia malĝojado.

Por la knaboj:

tromemfideco — 6,89%, kondutoj de koleginoj — 6,89%,

troa sloganeco de nuntempa vivo — 6,89% kaj:

krueleco, detaleco, konvinkoj de la gepatroj, senkaŭza rido, min-ignoro, troo da vortoj kaj manko de agoj, obstinemo, mensogoj, la instruistoj.

## 9. Abomeno

''Abomeno — la sento de profunda malemo al iu aŭ io'',

Ĉe la knabinoj:

drinkado de alkoholo — 14,28%, stulteco — 9,82%, malpureco — 5,57% kaj: virinoj senmoralaj, brutaleco, abrupteco, perforto, seksa malĉasteco, avidemo, intenca malplezurigado, psiĥa damaĝo de aliuloj, mia duonpatrino, malsincereco, araneoj, serpentoj, kadavraĵo, alkroĉiĝado de maljunaj viroj, fanfaronado pro seksumaj sukcesoj, seksumado kun kelkaj personoj samtempe, iusence ĉiu viro, malsanoj.



Ĉe la knaboj:

alkoholismo — 13,79%, vulgarigo de la seksa vivo — 8,62%, prostituiĝo — 6,89% kaj: la homoj rampantaj al povo kaj mono, malsincereco, homoseksualismo, grasa ulo kun 17-jarulino, mortigado, krueleco, pornografio, vendado de interesoj de la patrujo.

## 10. Angoro

''Angoro — la sento de subita kaj forta timo. Krio de angoro''.

Knabinoj angoris pro:

morto — 16,07%, ekzamenoj — 8,03%, estonteco — 6,25% kaj: perspektivo ne finlerni, malsanoj, maljuneco, soleco, kataklismo, milito, knabina libereco en seksaj aferoj, subita tragedio, neebleco helpi, ideo pri tio, ke eble mi mem baldaŭ ne komprenos junularon, propra malvenko, manko de amo inter la homoj, egoismo, rapida trapasado de tempo, neceso rezigni pri idealoj, turmentado de malfortuloj.

La knabojn angorigis:

maturekzameno — 10,24%, morto — 8,26%, estonteco — 8,26% kaj:

milito, kripleco, neebleco agi, krueleco, kreskanta malmoraliĝo de la socio, senpensemo de la homoj, estonta simileco al la patro, neceso poste vivteni sin.

Atentindas la simileco de la sentoj ĉe la knabinoj kaj la knaboj, kvankam el alia esploro rezultas, ke virinoj ''ŝajnas esti pli kuraĝaj en malkaŝado de la informoj, kiuj eksponas iliajn malfortecojn ... dume viroj pli volonte transdonas la informojn, kiuj substrekas ilian forton ...''
*(Derlega — Chaikin 1979).*

Pere, tio konfirmas la pretemon identiĝi kun difinitaj sentoj.

Atentindas tamen la simileco de la sentoj pro parencaj fontoj, devenantaj el la familia vivo.

Por la liceanoj la fonto de kontento kaj fiero estas antaŭ ĉio la lernejaj aferoj kaj la rilatoj inter instruistoj kaj lernantoj. Tamen ĉefas la familia vivo kaj — precipe — la kondutoj de tiuj, kiuj rolas en la familioj.

## 11. Sintenoj rilate familianojn

"Sinteno — estas iu relative konstanta emocia aŭ pritaksanta rilato al iu objekto aŭ inklino al tia rilato, esprimiĝanta en kategorioj pozitivaj, negativaj aŭ neŭtralaj..." *(Szczepan'ski 1973)*. Sinteno estas ankaŭ relative daŭra pretemo konduti en difinita maniero rilate objektojn, personojn, fenomenojn en kategorioj de proksimiĝemo, evitemo aŭ agresemo...

Jen estas prezentotaj la sintenoj de la sama junularo, kies afekciojn ni trarigardis ĉi-supre.

Ne pritraktante detale la diversfacetajn problemojn de familio kiel la socia grupo, ni nur memorigu, ke ĝi havas la kreivajn kaj sociigajn taskojn. Familio estas grupo, konservanta la biologian daŭrecon de la socio kaj transdonanta al la geidoj la kulturan heredaĵon de la etno aŭ de la nacio. La precipe intimaj rilatoj, emociaj ligoj de ĝiaj membroj kaj la daŭreco de la interligoj decidas pri graveco de familio por la vivo de pli grandaj sociaj aroj.

Familio estas grupo konsistanta el la personoj ligitaj per geedza kaj gepatra rilatoj (Johano Paŭlo la Dua 1985).

La rilatoj inter geedzoj kaj gepatroj kaj geidoj, kaj ankaŭ inter parencoj estas difinitaj per leĝo, moro, religio, tradiciaj modeloj de la reciprokaj influoj kaj per kvalito de la sentoj, kiuj ilin proksimigas aŭ malproksimigas. Familio karakteriziĝas per forta interna kompakteco, subtenata dank'al la internaj fortoj kaj al la ekstera premo.

Ekzistas tre granda dimensio de privateco en ĝia vivo kun la samtempa koncentro de la socia kontrolo. La najbaraj grupoj, la lokaj ariĝoj, la societaj rondoj kaj aliaj grupoj konstante kontrolas simptomojn de vivo de ĉiu familio kaj intervenas, se ĝi ne plenumas siajn taskojn akorde kun la fiksitaj modeloj.

Familio kreas ankaŭ propran kulturan medion, sian pli aŭ malpli klaran **vivostilon,** la individuajn manierojn esprimiĝi, siajn kutimojn kaj alkutimiĝojn en la limo de la ĝenerala nacia kulturo, formante la personecon de la infanoj en la procesoj de sociigo kaj de edukado, se la gepatroj havas konsciigitan edukan idealon kaj la konsciigitajn modelojn de kondutoj kaj de personoj, aplikatajn kiel ekzemploj.

Ĉi-parte ni prezentos la rilaton de la esplorita junularo al: 1) la patrino, 2) la patro, 3) la propra hejmo, 4) la maniero eduki infanojn kaj 5) la najbaroj. Aliajn rilatojn el nia esploro ni prezentos en aparta publikaĵo.

La prezentotaj konstatoj estas respondoj je la demandoparo: kio plej plaĉas (kio malplej plaĉas) al mi ...en la menciitaj faktoroj de la familia vivo. Ni prezentos ilin en la menciita sekvo, akceptante kiel bazon de la interna ordo la nombron de la indikoj — de la plej nombraj ĝis la malplej nombraj.



## 12. La patrino

La plej karakteriza estas tio, ke — spite al la ĝenerala tendenco aperanta rilate aliajn esploritajn faktorojn — multe pli da respondintoj ne esprimis la negativan pritakson ol la pozitiva pri la patrino (respektive: la knabinoj 38,40%; 9,28% kaj la knaboj 50% kaj 13,80%.

Proksimume ĝi estas inverso de la tendenco observata rilate la najbarojn (komparu la respektivan ĉapitreton) kaj la plejparton de la faktoroj de la familia vivo.

Al la junulinoj plej plaĉas ĉe la patrino:

komprenemo, laboremo, bonkoreco, zorgemo, amika rilato al la infanoj, sincereco, karaktero, gaja agordo, pacienco, devosento, altruismo, memzorgemo, belo, amo al la patro, bona gusto, scipovo krei bonan etoson, pureco, honesteco, kuraĝo konfirmi siajn erarojn. La patrino: "helpas en malfacilaj situacioj", "scipovas esti modelo", "manifestas varmon", "alia tia ne ekzistas".

Plej malplaĉas en ŝi:

nervozemo, kverelemo, eksplodemo, mensogemo, riproĉemo, malmodernaj vivvidpunktoj, indiferenteco rilate infanojn kaj edzon, egoismo, pesimismo, nescipovo edukadi, manko de objektivismo, akceptemo de ies influoj, pasiva akcepto de tio, kion alportas la vivo, prokrastado de la gravaj aferoj. "Mi ne povas konfesi al ŝi, ĉar mi timas ŝian koleron", "ŝi tro laŭte parolas", "ŝi estas regema".

Al la filoj plej plaĉas ĉe la patrino:

amo al la infanoj, laboremo, zorgemo, bonkoreco, senlima sindonemo, protektemo, komprenemo, honesteco, gajeco, aranĝemo, sindediĉo, modesteco, sincereco, amo al la patro. "Mi amas ŝin", "ŝi instruis al mi rekoni la mondon", "mi povas interparoli kun ŝi", "ni estas geamikoj", "ŝi ĉiam plenumas la promesojn".

Plej malplaĉas al la filoj: nervozeco, egoismo, troa subiĝemo, kverelemo, obstinemo,manko de sentoj por la patro, manko de komprenemo por la patro, troa bonkoremo, eksmodiĝintaj vidpunktoj, mallaboremo, detalemo. "Ŝi restas malantaŭe post la epoko", "ŝi foje volas montri kiu regas ĉi tie", "ŝi

ne permesas, ke mi klarigu al ŝi la ŝanĝojn''.

**Karakterize**; nur duono de la junuloj esprimis negativajn opiniojn pri la patrinoj. Ni poste rimarkos, ke la samo evidentiĝos rilate propran hejmon.

Ni rajtas konkludi, ke por la licea junularo la patrino kaj la patro estas: a) objekto de la intensa, penetrema perceptado, b)objekto de la profundaj konvinkoj, kiuj inklinigas la geidojn rilatiĝi al ili laŭ difinita maniero.

## 13. La patro

Al la filinoj plej plaĉas ĉe la patroj: komprenemo, laboremo, humorsento, trankvilo kaj sinregado, scio, justeco, diskretemo, respondeco, sindediĉo por aliaj, amikeco, protektemo, honesteco, bonkoreco, profesilabora ardo, vivlertemo, decidemo, ambicio. ŝparemo, malinklino drinki, scipovo ŝanĝi la atmosferon, persistemo, esti iu dank'al sia laboro. ''Mirakla homo'', ''mi povas turni min al li kun ĉiuj problemoj'', ''ofte li estas mia plej bona amiko'', ''li kapablas kompreni, kiam mi estas en malbona situacio'', ''li traktas min kiel la personon egalan al si'', ''mi havas miraklan paĉjon'', ''plaĉas al mi lia aspekto'', ''mi konas nur lian voĉon el telefono kaj la figuron el la fotoj''.

Ne plaĉas al la filinoj: nervozeco, manko de kulturo., despotismo, foriro de la hejmo, favorigado de la gefratoj, senkulpigitaj punoj, alkoholismo, konfliktoj kun la patrino, troaj ambicioj, nesufiĉa interesiĝo pri la familio,maniero esti, manko de toleremo por junulinaj kondutoj, troa kritikemo, ĉiama ĝustigado de la kondutoj, malofta restado hejme, eksplodemo, facilanimeco, kutimiĝoj, nescipovo manifesti sentojn.

''La patro ne agnoskas tion, ke junulino pariĝu kun junulo'', ''li tro malmulte parolas pri si'', ''ofte li estas tro enua'', ''li forĵetis min el la hejmo'', ''li ne allasas la ideon, ke li povus erari'', ''li interesiĝas pri aliaj virinoj kaj estas ridinda''.

Al filoj plej plaĉas ĉe la patroj: laboremo, decidemo, persistemo, ambicio, komprenemo, scio, zorgoj pri sorto de la familio, scipovo kontakti, trankvilo, respondeco, ekvilibro, famili-amo, cel-persistemo. ''Li ne enmiksiĝas en miajn aferojn'', ''li amas la patrinon'', ''mi povas sincere paroli kun li pri diversaj temoj'', ''li zorgas, ke mi estu respondeca homo'', ''li fidas al mia forto''.

Plej malplaĉas al filoj ĉe la patroj: troa nervozeco (18,96%), nesufiĉa interesiĝo pri la hejmo, manko de konstantaj sentoj, agresemo, vulgareco, tro ofta drinkado, fragila karaktero, mallaboremo, nekomprenemo por la edzino kaj por la geidoj, malkonstantaj agordoj. ''Li ne rimarkas, ke ankaŭ mi ion reprezentas'', ''li ne permesas persvadi al si la ŝanĝojn'', ''li foriris, mi traktas lin, kvazaŭ li ne ekzistas'', ''li stulte ŝercas''.



## 14. La hejmo

Negativan opinion pri la hejmo ne esprimis 50% da knabinoj. La nocio ''hejmo''postulis apartajn klarigojn, ĉar en nunaj sociaj kondiĉoj de Pollando ĝi ne estas sufiĉe klara kaj unusignifa.

30,35% de la knabinoj konstatis, ke plej plaĉas al ili la materia substanco de la hejmo: mia ĉambro, la mebloj, la loĝejo, ke mi havas la lokon por reveni, kie mi povas fermi min, la bonaj kondiĉoj ekzistadi, mi havas ĉambre la kudromaŝinon, la sofon, sur kiu mi povas oportune kuŝi, la estetiko de la interno.

La hejma atmosfero plaĉas al 25,17% de la respondintinoj kaj inkludas: kiam ni ĉiuj ridas, la rilato al lernado, mi travivas hejme vere la belajn momentojn, ni ĉiuj vivas akorde kaj helpas al ni, la familia varmo, ofte mi povas interparoli kun iu el la gepatroj, la reciproka fido, oftaj diskutoj, reciproka respekto kaj kulturo, pureco, amikeco kun la gefratoj, ni komune decidas pri la plej gravaj aferoj, momentoj de elkoreco, reciproka rilato de la gepatroj, favoremo, trankvilo, regula vivmaniero, granda toleremo.

Plej malplaĉas al la knabinoj: malbona loĝejo (44,64%) difinata per: manko de loko, troa humideco, manko de banejo, manko de akvo, malgranda surfaco, manko de varma akvo, manko de radio, manko de kuirejo, ĝi estas loko, en kiu ni nur dormas, bruo, longjara riparado. Malbona atmosfero (27,85%) manifestiĝis per: malakordo inter la gepatroj, ĉiuj vagas streĉitaj, mankas komprenemo, ŝanĝeblaj agordoj, konstantaj kvereloj, mia domo estas loko de malplezuroj, la patro kondutas malbone, la patrino ne havas tempon, la avino miksiĝas en ĉion , suspektemo de la patrino, tagoj pasas en konstanta kriado, ĉiu vivas per siaj aferoj, manko de amo, tago post tago la kvereloj, maloftaj kontaktoj, konfliktoj pro bagatelaĵoj, ni suferas pro manko de mono, konstanta malordo, falseco, egoismo, alkoholismo de la patro.

Al junuloj plej plaĉas en la hejmo: atmosfero de la kunvivado (56,89%) prezentita per: reciproka favoremo, harmonio, fido, trankvilo, granda libereco, egala traktado de ĉiuj, klopodoj de la patrino,granda klopodo de la patro pri bezonoj de la hejmanoj, familiaj tradicioj, pureco, fido de la gepatroj, fe-

liĉo, ĝusta edukado, reciproka helpo, laboremo de la hejmanoj.

Plej malplaĉas al ili: malbona atmosfero (43,10%), kiun kreas: nenecesaj streĉoj, indiferenteco, manko de kompreno inter la gepatroj, rilato de la patro al mi, manko de kontakto inter la gepatroj, manko de komunaj promenoj, malmulte da sentoj en la kontaktoj, troa laborado de la patrino, malmulte da komune travivita tempo, malebleco interkompremĝi kun la patro, mi malamas la nunan hejmon.

## 15. La maniero eduki

Inverse ol en la supraj okazoj, nun plejparto de la junularo rezignis pri pozitivaj opinioj (knabinoj — 38,39%, knaboj —41,37%).

Al la filinoj plej plaĉas en la maniero eduki: instruo esti memstara, fido, amo, disciplino, komprenemo, enkulturigo, alkutimigado peni, firmeco, persvado, respekto por aliaj homoj, pacienco, senpereco, partnereco, amikeco de la gepatroj, klarigado de la pli gravaj aferoj, justeco, scipovo formi la personecon, zorgado pri aspekto kaj kondutado.

Plej malplaĉas al ili: kiam la gepatroj nenion permesas, batado kaj kriado, troa dorlotado de la infanoj kiel de io malpli bona, riproĉado pro la pasinteco, blasfemoj, malicaĵoj, egoismigado.

"Al la infanoj oni donas ĉion krom la bona ekzemplo", "iuj ne maturiĝis por havi infanojn", "mi konsideras, ke al 18-jaruloj oni ne altrudu religion", "la gepatroj foje batas anstataŭ klarigi".

Al la filoj plej plaĉas: amika rilato de la gepatroj al la geidoj, instruo esti sentiva je la homaj aferoj, persvadado, preparado por vivi, enkulturigado, pacienco, serioza traktado de la geidoj, montrado de la vojo al memstareco, senpereco, granda afekcio de ambaŭ gepatroj.

Malplej plaĉas al ili en la maniero eduki: dorlotado, ĉionpermesado, batado, kriado, drinkado, malatribuo de egaleco, konservativismo, nesufiĉa memstareco de la geidoj, sekretigado de la gravaj aferoj, manko de komprenemo, manko de severeco en pravigitaj okazoj, manko de distanco.

"La idaro kreskas en tro oportunahj koniĉoj", "oni sidigas idojn sur molajn kusenojn".

## 16. La najbaroj

Al la junulinoj plej plaĉas ĉe la najbaroj: favoremo, afableco, reciproka helpo kaj komplezemo, senprofitemo, ĝentileco, trankvilo, komuna laboro antaŭ la domo, sincereco, scipovo kunvivi, solidareco.

"Ne ĝenas ilin laŭta muziko", "oni povas konfesi al ili", "ili estas amikecaj", "mi havas neniujn riproĉojn al ili", "ili helpas al si reciproke".

Malplej plaĉas al ili: malprudentaj klaĉoj, intervenoj en mian vivon, malordemo, bruemo, kvereloj, ĵaluzo, atakemo, envio, etburĝeco, facilanimeco, neglektemo, drinkemo, orgojlo.

"Ili edukas infanojn en malpureco", "ili malbone influas miajn agordojn", "ili volas imponi".

Al la junuloj plej plaĉas: favoremo, afableco kaj komplezemo, ĝentileco, senpereco, sincereco, trankvila maniero kunvivi, familia sportado, optimismo, societamo kaj varma atmosfero.

Plej malplaĉas al ili: klaĉado, enmiksiĝado en aferoj de aliuloj, manko de kulturo, izolo, senkaŭzaj malicaĵoj, ĵaluzo, mallaboremo, malpureco, egoismo, senidealismo, la rilato al maljunaj gepatroj, mensogemo, malbona maniero travivadi liberan tempon.

## 17. Konklude

Analizante la prezentitajn opiniojn de la licea junularo, ni ricevla la grundon por konkludi, ke:

— la patrino, la patro kaj la hejmo estas tiuj elementoj kaj faktoroj de la familia vivo, pri kiuj oni esprimis ĉefe la pozitivajn konsiderojn limigante la negativajn; ili do estas la agnoskataj valoroj de la familia vivo, protektataj eĉ spite la negativajn spertojn;

— la filoj manifestis pli da modero en esprimado de kritikaj opinioj;

— la opinioj de la filinoj pri la patroj estas pli emociaj ol tiuj de la filoj pri la patrinoj;

— pro manko de la observoj pri kondutoj de la liceanoj, ni ne havas grundon por konkludi pri iliaj efektivaj sintenoj; ili ja esprimis nur siajn vortigitajn deklarojn.

En la naturaj sociaj kondiĉoj ne eblas elvoki la situaciojn, en kiuj esploreblus la efektivaj agoj (ne nur la deklaroj). Ni ankaŭ devas substreki, ke en kondutoj ne ĉiam manifestiĝas la efektivaj sintenoj (*Linton 1945*).

Ekzistas la probableco, ke analizo de aliaj faktoroj de la socia vivo, inkluditaj en nian esploron, permesos klarigi la dependecojn, kiuj ĝis nun ne aperis kun sufiĉa klareco.

## 18. Referencoj

*Derlega, V. J. — Chaikin, A. L. (1979): Intymność i otwartość w stosunkach interpersonalnych. — Przegląd Psychologiczny, 2, 257-251.*
Johano Paŭlo la Dua (1985): *Familiaris Consortio* (Pri la taskoj de la kristana familio en la nuntempa mondo). Tradukis *T. Tyblewski. — Messkirch.*
*Linton, R. (1945): The culture Background of Personality. — D. Appleton Century Co. Inc. New York.*
*Szczepański, J. (1973): Elementarne pojęcia socjologii. — Panstwowe Wydawnictwo Naukowe. Warszawa.*
*Tyblewski, T. (1984):* Afekcioj en turismo. — Scienca Revuo, 25-35. Pizo.
*Żebrowska, M. (1966): Psychologia rozwojowa dzieci i młodzieży. — Panstwowe Wydawnictwo Naukowe. Warszawa.*

### *Emocjonalne odzwierciedlenie życia rodzinnego*

*Badając postawy Polaków wobec rzeczywistości spoecznej, odwołaliśmy się także do uczuć młodzieży, doznawanych w życiu rodzinnym. Uzyskaliśmy jej opinie o zadowoleniu, dumie, zakłopotaniu, niepokoju, poczuciu winy, złości, wstręcie, przerażeniu, szeregując je według wielokrotności i jakości źródła. Zawarliśmy tu także sady młodzieży licealnej o matce, ojcu, własnym domu, sposobie wychowywania dzieci oras o sąsiadach, jako czynnikach tworzących etos życia w rodzinie. Sprawozdanie to publikowane jest w języku esperanto pa raz pierwszy; w języku polskim nie mogło się ukazać na skutek sprzeciwu instancji politycznych. Powody owego sprzeciwu sa dla autora niepojęte.*

# Fondiĝas esperantista laborgrupo pri astronomio

Ni kolektas adresojn de esperantistoj, kiuj havas iun ajn rilaton al astronomio. Ni bezonas antaŭ ĉio aktivajn kunlaborantojn (por traduki aŭ verki artikolojn kaj kompili terminaron), sed ni deziras scii ankaŭ pri tiuj, kiuj ne volas aŭ ne povas kunlabori.

Interesatoj kontaktiĝu kun *Géza Felső*
*Péter Pál u. 27*
*H-1221 BUDAPEST*
Hungario

### Landaj delegitoj de ISAE:

| | |
|---|---|
| **Argentino** | *Dr. Máximo Valentinuzzi, Gascón 520, RA-1181 Buenos Aires* |
| **Aŭstralio** | *Ing. K. McG. Bowling, 42 Catalpa Crescent, Turramurra, NSW, 2074* |
| **Aŭstrio** | *AEI, Grete Breunlich, Stoesslgasse 2/8, A-1130 Wien* |
| **Belgio** | *Léon J. Hauregard, rue du Centenaire 147, B-4600 Liège-Chênée* |
| **Brazilo** | *Ing. Enivaldo Alves Silva, CxP 04-0144, BR-70000 Brasília (DF)* |
| **Britio** | *Dr. Marjorie Flint, 3, Longcroft Park, Beverley, N. Humberside HU17 7DY* |
| **Bulgario** | *Ljubomir Miĥajlov, str. Valentin Andreev 41, BG-1619 Sofia* |
| **Ĉeĥoslovakio** | *Jiří Laube, Alej RA 811, CS-413 01 Roudnice n. L.* |
| **Danlando** | *Prof. Paul E. Kustaanheimo, DIA-E, 451, Danmarks Tekniske Højskole, DK-2800 Lyngby* |
| **Finnlando** | *Sirkka Mattlin, Hurtankatu 6, SF-05820 Hyvinkää* |
| **Francio** | *Jean François Blin, 17 rue du Saucy, F-89400 Migennes* |
| **F.R. Germanio** | *Dr. Gerhard Kalckhoff, Schuckertstr. 14/XI, D-8000 München 70* |
| **Hispanio** | *Johano Guiñón C/ Wilfredo 6-3°-2a, Barcelona 1* |
| **Hungario** | *János Sárközi, Cserje u. 35, H-2600 Vác* |
| **Irano** | *Fatemeh Faraĝi, apt. 8 No. 3, kh. 20, Amirabad Shomali, Tehran 14-399* |
| **Italujo** | «Edistudio», *cas. post. 213, I-56100 Pisa* — pĉk 12230561 |
| **Japanio** | *Takeo Sugano, 6-5 Ohte-tyoo, J-569 Takatsuki-si Oosaka-hu* — pĉk Oosaka 4-021212 |
| **Jugoslavio** | *A. Jakupović, Filipa Višnjiča 39, YU-11080 Zemun* |
| **Meksikio** | *Héctor Vázquez, Avenida 7 No 267, México, 13, D.F.* |
| **Nederlando** | *Ing. J. O. de Kat, Kraaienlaan 3, NL-2566 RA Den Haag* |
| **Norvegio** | *Prof. Carl Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, N-Oslo 2* |
| **Novzelando** | *Prof. C. J. Adcock, 174 Oriental Parade, NZ-Wellington 1* |
| **Pollando** | *Tyburcjusz Tyblewski, Bartka Zwycieczcy 11/1, PL-58 500 Jelenia Góra* |
| **Portugalio** | *Portugala E-A, R. Dr. João Couto, 6 R/C.-A, Lisboa 4* |
| **Rumanio** | *Ing. Dorin Hehn, Lugojuluj 21, sc. A, R-1900 Timişoara* |
| **Sovetio** | *Dr. Vladimir Gromov, Santjago de Kuba 2-1-55, SU-194291 Leningrad* |
| **Svedio** | *Christer O. Kiselman, Tuvängsvägen 38, S-752 45 Uppsala* - pĉk 55 5735-0 |
| **Svisio** | *Rudi Hauger, ETH-Hönggerberg, Laboratorium für Festkörperphysik E17, CH-8093 Zürich* |
| **Usono** | *Ken Thomson, P.O. Box 663, Houston, Tx. 77001* |
| **Venezuelo** | *prof. Juan Eduardo Bachrich, Apto. 3833, Carácas 1010 A* |